# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-40 sendita el Budapeŝto la 21an de septembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Estonta prokl-AMO

Jen la nuna stato de la AMO-programo por la sekvaj monatoj. Kvin kontinentoj celataj. Tri konfirmitaj! Sekvos tuj kiam eblos pliaj detaloj, kun listoj de kontribuantoj kaj temoj por forumoj. Granda tema vario!

**AMO 78:** Kroatio:  nov. 13 -14. Nova lando.por AMO.
Temo: Literaturumi traduke (okazas kadre de tiutema kunsido).
**AMO 79:** Japanio/Azio: kun IKEF (komercistoj); dimanĉe la 28an de nov.
Temo: Etikaj aspektoj de komerca agado.
**AMO 80**: Togolando: - decembre. 23-26, Lomeo.
Temo: Esperanto per io, io per Esperanto.
***AMO 81:*** Aŭstralio (oceania temo): januare 7-13, kadre de la dulanda kongreso (NZ/AU) Sondita, ĝis nun sen reago.

***AMO 82:*** Azio, strategio por rejunigo, pro la surprizaj rezultoj raportitaj en EKO 38. Sondita ĉe Japanio, Koreio kaj Ĉinio. ĈEL (Ĉinio) respondis agnoske, kaj debatas la eblon. AMO atendas pliajn proponojn. Seminario iam en februaro aŭ marto.

Ĉu 2022 iĝos la jaro, kiam ni reiros al fizikaj seminarioj? Klare, ĉiam restos la perreta partopreno; tamen Greziljono pioniris jam aŭguste de 2021 per hibrida modelo.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

EKO logo

**ENHAVO**


- AMO 78- 82
- Hispana Kongreso
- Israela sidejo
- Katolikoj kontribuas
- Afrikaj projektoj
- Kantofestivalo

# Virtuala Hispana Kongreso

Hispana Esperanto-Federacio (HEF) liveris jam la ĉefajn informojn pri la venonta 79a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazos virtuale, la 2an kaj 3an de oktobro 2021.La programo kaj la maniero partopreni troviĝas en jena ligilo. Ni memorigas ke unu el la ĉefaj eroj estos la omaĝo al Federico García Lorca okaze de la 85a datreveno de lia murdo, per la reeldono en bita formo de lia "Cigana romacaro" (tradukita antaŭ 50 jaroj de Fernando de Diego) kaj la papera publikigo de antologio de liaj poemoj tradukitaj en Esperanton fare de Miguel Fernández, kiuj estos prezentataj sabaton matene. Eblas aliĝi al la kongreso, senpage, ĉe: https://esperantujo.io/hef/alighilo/.

Laŭ bitbulteno 75 – eminenta dulingva reta komunikilo de HEF.

# La israela sidejo ekuzata

Dek tri s-anoj kunvenis en la nova sidejo de ELI (vidu la foton), en la moderna Alonturo en Tel-Avivo. Tie ELI aĉetis oficejon, kiun ĝi intencas luigi kaj tiel havas la rajton senpage uzi la apudan kunvenejon. Kvankam ĝi estas pli malgranda ol nia antaŭa klubejo en WIZO, ĝi tamen estas senpaga (tiu de WIZO kostas pli ol mil siklojn monate), ĝi havas senliman kafon kaj modernan komputilan ekranon, kaj estas ne malpli centre lokita (por ekster-telavivanoj eĉ pli facile atingebla je 10-minuta promeno de la trajna haltejo HaShalom).




La programo temis pri la nova septembra n-ro de la revuo *Esperanto*, kiun mi projekciis sur la granda ekrano. Sekvis vigla babilado kaj kafumado. Poste okazis kunsido de la Estraro, kiu traktis i.a. la 21-an Israelan Kongreson kiu okazos komence de oktobro en Tel-Avivo (la 22-a IK okazos samloke, sed kun la eksterlandaj gastoj kiuj ne povos partopreni en oktobro pro la korono-limigoj).

# Katolikoj pri grava nuntempa temo

La 10-an de septembro, IKUE aranĝis sukcesan ZOOM-prelegon kun ege peza temo "Memmortigo aŭ memestimo?" okaze de la Monda tago pri prevento kontraŭ memmortigo. Ĉeestis e-istoj el 13 landoj de Suda Ameriko (Argentino, Brazilo, Ĉilio) kaj Eŭropo (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando, Slovakio) kaj Azio (Koreio). La prelegantoj sac. Albert Reiner kaj Milton Paolo de Lacerda aliris la temon de eklezia kaj psiĥologia vidpunktoj. Dum la diskuto oni substrekis la gravecon de la temo, kiu en la hodiaŭa tempo tuŝas ĉiujn sociojn. Estis

prezentitaj ankaŭ kelkaj statistikaj informoj rilataj al la lasta jaro lige al la pandemio, kiuj donas la seriozajn zorgojn pri kiuj ni ĉiuj devas konscii. La prelego estis alirebla por ĉiuj, ĉar IKUE i.a. pri ĝi informis per Eventa Servo de UEA, kio certe kunportis kelkajn partoprenantojn. La partoprenantoj esprimis kontenton ke IKUE kompetente aliris la temon. IKUE estonte planas okazigi similajn fakprelegojn. Tio estas bona maniero kaj profundiĝi en la kredo, sed same montri la starpunktojn de la Katolika Eklezio pri la temoj gravaj por la moderna homo.

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

## Alvoko por Afrikaj projektoj – iniciato de UEA

Tiu ĉi alvoko, al ĉiuj afrikaj esperantistoj loĝantaj en la kontinento, validas ĝis la 31-a de oktobro 2021. Por la partoprenantoj temas pri invito prezenti konkretajn projektojn, "kiuj estas vivo-povaj kaj gajno-povaj ekonomiaj projektoj mastrumotaj de la iniciatinto unuope aŭ kunlabore kun aliaj esperantistoj". La prezentantoj de projektoj devos esti konataj de la komisiono por UEA-agado en Afriko, kiu morale povas garantii, ke ili estas seriozaj kaj honestaj. Ĉiuj interesatoj bonvole priskribu kaj sendu siajn konkretajn projektojn al afrika.komisiono@googlegroups.com. Ĉe la sama komuna retpoŝtadreso de la komisiono bonvenas ĉiaj demandoj pri la alvoko. La Afrika Komisiono de UEA ĝisdatigis sian laborplanon, celante la plifortigon, antaŭenigon kaj pluvivigon de la internacia lingvo Esperanto en la kontinento, kaj ĝi havas, sub la nomo *Afriko Faras*, apartan fokuson pri ekonomie monenspezigaj iniciatoj, kiuj helpos kaj la projektportantojn kaj la investantojn protifi.

Afrika Komisiono de UEA, membro de la Afrika Komisiono de UEA,  Adjévi Adjé

## UEA aktive subtenas la kantofestivalon

Kulmine de la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021, aŭspiciata de UEA, okazis dimanĉon, la 12-an de septembro 2021, la Koncerto de la Premiitoj.

Ni invitas vin spekti la videon de tiu koncerto en la Jutuba kanalo de UEA, UEAviva: https://youtu.be/Eqru6imwOJc

Pli da informoj pri la Festivalo (pola nomo: Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej) troveblas en: https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu

========= vortoj: 835 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.